

# PACO KAJ JUSTECO



ORGANO DE LA | ORGAAN VAN DE  
NEŬTRALA ESPE- | NEUTRALE ESPE-  
RANTO - MOVADO | RANTO - BEWEGING  
BRUGGE €

# Paco kaj Justeco

ORGAAN DER E<sup>o</sup> BEWEGING -- BRUGGE

Prezidanto : Drs F. ROOSE, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge.

Sekretariĵo : ROOSE-DEKERSGIETER, J. & M. Sabbesfr., 12, Brugge.

Propagando : MAERTENS G. Nieuwstraat, 54, Assebroek.

Postkonto : 291429 Maertens Gr Assebroek.

## Nicholas pudding come KAJ lia Orkestro

Okazis la dimanĉon post Kristnasktago — konatiĝis ke la lastan dimanĉon ili ĉiam ludis en Longpuddle preĝej-galerio, kvankam ili ne sciis ĝin tiam. Vi povas scii, sinjoro, ke la muzikantoj konsistigis tre bonan orkestron, preskaŭ tiel bonan kiel la Mellstock players, kiuj estis gvidataj de la Dewys ; kaj tio signifas multon.

Estis tie Nicholas Puddingcome, la orkestrestro, kun la ĉef-violono ; tie esties Timothy Thomas, la bas-violonisto ; John Biles, la tenorviolonisto ; Dan'l Hornhead, kun la serpent-muzikilo ; Robert Dowdle, kun la klarineto ; kaj Sro Nicks kun la hobojo ; ĉiuj sanaj kaj fortaj homoj, kaj fortvonto-donantaj homoj-tinuj kiuj blovis. Pro tio ili estis multfoje imitatej dum la Kristnask semajno je skotajĉekaj aliaj dancadoj ; ĉar ili povis ludi je unua vido viglan dancon aŭ kornpipdancon tiel bele kiel psalmo kaj eble pli bone ; ne celante paroli sen respekto. Abrupte, la unu duonhoron ili povis ludi Kristnaskkanton en la halo de la noblelulo kaj trinki teon kaj kafon kun la gesinjoroj tiel modeste kiel sanktuloj ; la postea, ili povis blovi kiel sovaĝaj ĉevaloj la « Dashing white sergeant » en « The Tinker's Arms », por naŭ daneparoj aŭ pli, kaj englutu rum-kaj-cidron tiel varmiga flamo.

- Ni ĉiam pravas kaj la sorto ĉiam malpravas.
- Kiam ni estas koleraĵ, ni estas frenezaj.
- Estas multe da ĉagreno en la mondo sed la plej grandan ĉagrenon faras la homoj al si reciproke. (Baronino Anna von Kranz).

« Nu, tiu-ĉi Kristnasktempon, ili estis iritaj al l'unu dancaĉo post l'altra kaj tute ne estis dormintaj. Tiam alvenis Kristnasktago, ilia fatala tago. Estis tiel akre malvarme tiu jaron ke ili apenaŭ povis sidi en la galerio ; kaj ĉar la preĝantaro malsupre en la preĝejo havis fornon por distanciteni la froston, la muzikantoj en la galerio havis tute nenion. Tial Nicholas diris dum la matena Diservo kiam frostis akrege, " La Sinjoro perĉe, mi ne toleras plu tiun rigidi gan veteron ; hodiaŭ posttagme ze mi havos ĉion en mia interno por varmigi min, eĉ se ĝi kostus regan acetsumon.

Tiel li kunportis galonon da varmiga brando kaj biero, jam intermiksitaj, al la preĝejo dum la posttagmezo kaj tenis ĝin drinkeble varma en la basviolonujo de Timothy Thomas ĝis ili bezonos ĝin, kiu estis fingrita kvanto dum la absolveo, alĉa post la kredo, kaj la resto dum la komenco de la prediko. Post la lasta drinko, ili sentis sin sufiĉe komfortaj kaj varmaj, kaj kiam la prediko komencigis pley malfeliĉe por ili, estis longa prediko tiu-ĉi posttagmezon-ili ekdormis ĉiuj ; kaj jen ili dormegis finfine.

Estis tre malhela posttagmezo, kaj dum la fino de la prediko, de la tuta preĝejo oni povis nur vidi la du kandelojn ambaŭflanke de la pastro sur la katedro kaj lia parolanta vizaĝo malantaŭ ĝi. Post ke finfine estis finita, la pastro ekkantis la " Vesperan Himnon ". Sed ne orkestre ekfiks la sonon, kaj la popolo turnis la kapon por ekscii la kialon ; estis tiam ke Levi Lumpet, knabo kiu sidis en la galerio, brakpulis Timothy kaj Nicholas, kaj diris " Komencu ! Komencu !

" He ? Kio ; diris Nicholas, levigante ; kaj la preĝejo tiel malhela kaj lia kapo tiel konfuza, li kredis ke li estis en la dancejo, en kiu ili ludis la psaltan nokton, kaj antaŭen li ludis per arĉo kaj violono : " The devil among the Tailors " la favora ario de niaj cirkauaĵoj dum tiu-ĉi tempo. La celero de la muzikantaro, ĉar ili estis en la sama animstato sekvis sian orkestrestro per sia tuta forto kiel kutime. Ili tiel ludis ke ĝia sono per la bas-notoj de " The devil among the tailors ", tremigis la areanaĵojn de la plafono kiel fantomoj ; tiam Nicholas, vilante ke neniu movis, ekkriis dum ke li skrapis (je lia kutime ordona maniero, kiam la popolo ne konus la figurojn).

" Paroj, interkrucigu la manojn ! Kaj kiam mi grincigos la violonon je la fino, ĉiu kisu sian kundancanton sub la visko !

La knabo Levi tiel ĉemis ke li malsupren saltis de la ŝtuparo kaj hejmen kurogis kiel la fulmo. La pastro haro ververe supronigis, aŭdante la diablan arion furi zi tra la prediko, kaj kredante ke la muzikantaro frenezigis, li levis la manon kaj diris ; Halt ! halt ! halt ! halt ! Kio estis ! Sed ili ne aŭdis ĝin pro la ludo de sia propra ludo, kaj ju pli li kriis, des pli ili ludis. Tiam la popolo levigis de siaj benkoj, margar-

- Al niaj amikoj ni devas fari bonon kiam ili estas apud ni kaj ilin ni devas laŭdi kiam ili estas for.

dante al la tero kaj pensante « Kion ili celas per tiu malpiaĵo ! Ni estos punataj kiel sodomo kaj Gomorrah ».

Tiam la nobelulo venis el sia verde bajetita benko, kie aro da nobelaj sinjoroj kaj sinjorinoj, je visito en lia domo adoris kun li kaj iris stari antaŭ la galerio kaj pugnigis lamanojn al la muzikantvizitaĝoj, dirante :  
" Kio ! En tiu respektinda konstruaĵo Kio ! "

Finfine ili aŭdis ĝin super sia propra ludo kaj haltis.

" Neniam plu tiu insultanta, malgracia afero — neniam plu ! : diris la nobelulo kiu ne povis dominĉii sian pasion.

" Neniam plu ! diris la pastro, kiu estis malsupronirinta kaj staris flanke de li.

" Eĉ ne se la anĝeloj el ĉielo " diris la nobelulo (li estis malpia homo, kvankam nun li ŝajnis partianiĝi al la Pastro).

" Eĉ ne se la Anĝeloj el ĉielo " te revenis " li diris " unu de vi, fi-muzikantoj ludos ankoraŭ noton en tiuĉi preĝejo, pro la insulto al mi al mia familio, al miaj vizitantoj, kaj al Dio ĉiopova, kiun vi faris hodiaŭ posttagme ze !

" Tiam la malfelica preĝejorkestro renormalideigis kaj memoris kiel ili estis ; kaj estis vidindaj Nicholas Puddingcome kaj Timothy Thomas kaj John Biles, kiuj malsupreniretis de la galeri stuparo, iliaj violonoj sub la brako ; kaj malfelica Dan'l Hornhead kun lia serpent-muzikilo kaj Robert Dowdlenkun lia klarioneto, ĉiuj aspektantoj tiom malalita kiom ŝegloj ; kaj for ili iris. La pastro povus esti pardoninta ilin, eksciante la verecon pri ĝi, sed la nobelulo ne volis. La saman semajnon li mendis gurdon, kiu povis ludi 22 novajn psalmonojn tiel ekzaktoj kaj apartaj ke kiel AĴN pekema vi estus, vi nur povus ludi psalmonojn.

Li havis vere respekteman homon por turni la krakon, kaj la ekskludantoj ne niam plu ludis.

Thomas HARDY  
tradukis el la Angla E.O.B.

## Paĝo de la Esperanto movado

Ni vivas denove en pli malpli demokratiaj landoj. (Kelkaj diras ke ankoraŭ ekzistas tute ne demokratiaj landoj). Kaj sub tiu varma suno la bela kreskaĵo de la Esperanto movado povos denove ekilori. Malfeliciaj demokratiuloj ne lernis la bonegan lecionon donitan per la mondmilito. Do la demokratio kiu estis jam degeneranta en multaj

— Sekvi Dion kaj obei al la racio estas la sama.


landoj antaŭ la milito, anstabaŭ ol resaniĝi, nur pli degeneriĝas. Nia lando estas certe en tiu kazo. Kelkaj aserias ke tiu stato nur kapablas konduki al malpli da demokratieco kaj al pli da diktatoreco, ĉar por ĝegi tian landon, la registaro bezonas pli kaj pli da " eksterordinaraj povoj ". Karaktereca signo de tiu degeneranta demokratio estas ke la partioj ne tiel zorgas por la bonfarto de la tuta lando kiel por la bonfarto de la propra partio, kaj la malbonfarto de la aliaj partioj. Sekvo de tio estas ke la politiko akaparas ĉion. En ĉio miksiĝas la politiko. En la nominacio de personoj sur ĉiuj terenoj de la hama okupado. En la starigo de kulturaj aŭ aliaj grupoj k. t. p. k. t. p. Ju pli la politiko miksiĝas en ĉio desmalpli oni trovas ion ne ankoraŭ kontaminitan de tiu bacilo, kaj despli oni bezonas la politikon. Baldaŭ ĉe la politikistoj ne plu ekzistas intereso je io ekster la politiko. Flanke de tio estas ankoraŭ io alia. La " idealismo " kaj la vorto " idealismo " ekhavas malbonan signifon. Tiuj personoj ja tre malmulte atingas ĉar ili staras sendependaj de la politiko. Oni do tuj pensas pri personoj ne havantaj rezistan senton, pri revantoj. Ankoraŭ malpli bone. Estas idealistoj kiu fakte grave eraris. Ili kredis helpi al starigo de pli bona mondo, helpante nehumanan sistemon aŭ lasante sinuzi de tiu sistemo. Ni tre deziras scii en kiu grado la supra skizo montras la efektivecon en la aliaj landoj. Kaj en tiu kazo, ni estas tre sevolemaj por scii kiamaniere la Esperanto movado reakcios je tiu stato, ĉiukaze ni vidas en ĝi danĝeron por la vera, bona Esperanto movado. Tiu bela movado kun principoj de interpopola interfratiĝo, de proksimumado, de helpemo, de la " interna ideo ".

Kiel fantomo staras antaŭ ni denove la organiza problemo. Ne malpli ol kvar internaciaj organizoj demandas la atenton kaj la subtenon de la esperantistaro : U.E.A. — I.E.L. — E.M.O. — kaj la " Universala Ligo ". La du unaj estas jam bone konataj. Ili celas internacie grupigi la NEŬTRALAJN esperantistojn. La du aliaj estas novaj kaj malsimilaj. E.M.O. funkcias sub la gvidado de S-ano P. A. Schendeler el Eindhoven, tre sperta kaj tre kapabla esperantisto. Li opinias ke devas ekzisti " Esperanto Mond-organizo " kiu grupigas ne nur la neŭtralajn esperantistojn kaj asociojn sed ĉiujn. Ni havas ekzakte la saman opinion. Kvankam samtempe devas resti internacia organizo de la nuraj neŭtraluloj. Cetere tiu(i) jam ekzistanta (j) organizo (j) certe ne ĉesos sian agadon por plaĉi al la E.M.O. S-ano Schendeler kun la longjara sperto, scias tre bone ke kun la organiza problemo, tre intime ligita venas ankaŭ la monproblemo, pago de kotizo, de revuo k. t. p. Pro tio en la prepara projekto li bone studis ĝin kaj kredas ke li trovis solvon. Se ĉiuj esperantistoj aligas, ili fakte nur devas doni etan monsumon ĉar la granda aro de sumetoj faros tamen unu ampleksan enspezon. Tio estas

— Juruloj vivas per espero ; maljunuloj vivas per rememoroj.

— Amiko estas tiu kiu scias ĉion pri mi, kaj kiu tamen ankoraŭ amas min.

tute ĝusta! Sed jen la granda problemo: ĉu ĉiuj, aŭ almenaŭ, ĉu la plej granda parto aligos? Ĉar ekzistas ne nur la nova E.M.O. Kaj alia novulo anoncas sin: "Universala Ligo". Ties gvidanto estas ankau tutmonde konita: Pastro Andreo Cseh. Lia projekto malsimilas de la tri antaŭe nomitaj organizoj. Li volas unuigon de ĉiuj pacifistoj en la mondo. Do lia movado estas fakte ne Esperanto-movado. Sed estante internacia ĝi havos la malfacilajonde la lingva diverseco. Tiun problemon ĝi solvas per Esperanto. Kaj por verbi la unuajn anojn ĝi direktas sin al la esperantistoj. Inter tiuj la gesamide anaro devos elekti! Kelkaj elektos. La plej granda parto tute ne elektos. Nia opinio? Ni ju ĝas la tri skizitajn movadojn necesaj, Sed ne la amaso de la esperantistoj progresigos ilin. La plej delikata afero de la mono (ĉar krom tiuj tri ankaŭ la landaj kaj lokaj organizoj apelacias al nia monujo!) estos nur solvata kiam la gvidantoj de la tri movadoj intertraktos kaj interkonsentos. Ili nun sendas cirkulerojn kaj baldaŭ eble revuetojn al la esperantista popolo por klarigi, konvinki, varbi. Bone, tre bone. Sed unue ili devashavi komunan agadoplanon. Tiam la tri movadoj necesagaj progresos kaj povos fari multe da bona al la serĉanta, baraktanta homaro.



## Kristnasko 1946


Denove ni festas Kristnaskon. Jes, oni ankoraŭ festas Kristnaskojn. Oni versajne ĉiam festos ĝin, ĝi saĝnas esti la plej vivkapabla kaj plej longdaŭra festo. Efektive ĝi venas el la pragermanaj tempoj. Sed la karaktero de ĝi kaj ĝia enhavo ja tute ŝanĝiĝis. Ne plu ĝi estas la religikulto pagana je la kverkoj en la densegaj vastegaj arbaregoj. La Kristaismo venis, prenis kaj ŝanĝis ĝin. Kaj dum jarcentoj kaj jarcentoj ĝi estis la rememorigo pri la naskigo de Kristo kiu alportis la lumon en la mallumo, la amon meze de la malamo, la bonon meze de la malbono kaj la pacon meze de la malpaco. Ĝi konsekvence estis la festo de la intimeco, de la tre intime sentata paco de la homoj de bona volo t. e. de la homoj kiuj volas la bonon. Sed la homaro ne restas neŝanĝita. La mondo kaj la homoj evoluas. Denove la karaktero kaj la enhavo de tiu festo komplete ŝanĝiĝis. Vi ja bone vidas ke ne plu estas

- Estas la amo kiu movigas sunon, lunon kaj stelojn. (Dante)  
— Oni povas ankaŭ mensogi kiam oni silentas kaj aŭskultas

eble ke la mondo ankoraŭ festu ĝin kiel niaj mezaĝaj gepatroj festis ĝin kaj kiel kelkaj inter ni ankoraŭ faras. Ja la kondiĉoj al tio, tute ne plu ekzistas. Ĉu ankoraŭ ekzistas amo? Ne. Pasio, jes. Ĉu ankoraŭ ekzistas bona volo, t. e. volo al bono? Ne. Volo al profito, jes. Ĉu ankoraŭ ekzistas tiu soifego al la justeco? Ne. "Ĉu savu sin el danĝero" jes. Estas vere ke dum tiu sanktega nokto oni ankoraŭ aŭdos mirinde belajn Kristnaskokantojn kaj vere la belfrido de Brugge en la kielia aëro aŭdigos la dolĉajn melodiajn tonojn de la sonorilaro. Sed la homoj tamen ne plu estas en la animstato por tute kompreni kaj ĝui kaj ŝategi ilin. Eĉ la amasoj kiuj iros al la meznokta S. Meso faros ĝin ĉar estas kutimo kaj ankaŭ... estas foje io neordinara.

La esperantistoj tamen devus esti aliaj. La esperantismo belege harmonias kun la senco de la Kristnaskofesto. Se oni pristudas la vivon kaj la karakteron de Zamenhof. Se oni legas ĉion kion li skribis pri siaj idealoj, pri la deveno kaj la celo de Esperanto, ĉio parolas pri hominterfratigo, paco, justeco inter la nacioj. Ĉu li mem ne estis ekzemplo de morale altstara viro? Moralo en la plej larĝa senco de la vorto. Tial mi esperu ke almenaŭ la esperantistoj povos konstrui inter si idealan mondeton. Kaj la pleja minimumo: nia karega grupo devas esti tia ideala mondeto en kiu ni goje sed plej intense festas Kristnaskon.

DRS. F. ROOSE.



## John Doorneveld.

Ni volas en tiu ĉi numero konigi al vi junan poeton kiu ekhavis jam ian famon en la Esperanto mondo ĵus antaŭ la milito. Bedaŭrinde la milito haltigis la laboron de niaj gesamideanoj. Alie li certe estus jam stelo brilanta al la firmamento de nia poezio.

Li naskiĝis la 14 an Novembron 1913 en Leiden. Post kelkaj jaroj la familio Doorneveld venis al Dordrecht. Tie li faris mezajn studojn. Poste li laboris en oficejo de Lips (ne de Jo Lips! sed de la fabriko de brulrezistaj mons. ankoj!) Li estas esperantisto de post kelkaj jaroj jam. Lia idealismo tuj estis allogata de la frateca sento en la Esperantisma movado. Li multe korespondas kaj en la malmultaj liberaj horoj li verkas kaj preparas paroladojn.

- Kiam oni multe parolas oni preskaŭ ĉiam diras ion kion oni prefere ne diru. (Ku Fu Tsen).  
— Se oni ĉion scius, oni ĉion pardonus.  
— Gardu la ordon kaj la ordo gardos vin.

## Angulo de la serĉemuloj.

Hodiaŭ ni publikigas enigmon tre interesan, faritan de nia abonanto kaj kunlaboranto A. SPRUYTTE kiun ni kore dankas kaj kiun ni esperas baldaŭ foje vidi en nia rondo. Sendu aŭ donu solvojn antaŭ la 15-a Januaro 1946 al S-ano. ROOSE E., J. & M. Sabbestraat, 12, Brugge. (Zie Kruiswoordraadsel).

Jen la situacio hodiaŭ :

10 poentoj : Marie-Thérèse ROOSE — Germaine MALLET — Et. DE BAETS — A. SPRUYTTE — Gr. MAERTENS — Gilbert BRUYNEEL.

9 poentoj : Rog. ISERENTANT

5 poentoj : F. ROOSE — H. DE KERSGIETER — F. NORRO — J. CALLEWAERT — Marie-Louise SENAVERE — A. V. d. DONCKT.

Por rememori la haveblajn premiojn, ni denove publikigis la poentliston :

5 poentoj	—	premio : unu libreto el la serio de pacifistaj verketoj.
10	—	biciklo-flago
15	—	Se aŭskultas la animo
40	—	E° in een doosje, van Bakker
40	—	Kompleta gramatiko kaj vortfarado

Paco !

Kia vorto !

Dum ses longaj, longegaj jaroj la homaro estis subpremita de la terura mondmilito, kiu ĉi fojon efektive estis mondmilito en la plena senco de l' vorto,

Kaj jam antaŭ la fatala dato de la unua de Septembro mil naŭcent tridek naŭ, kiam eliris la oficiala militodeklaro el Londono, en kelkaj partoj de la mondo la klakintado kaj bruego de l'armiloj estis audataj. — Kaj nun, Septembro mil naŭcent kvardek kvin, nun regas silento. Ĉie en la mondo la armiloj ripozas.

Ĝis kiam ?

Ni apenaŭ povas kredi, ke ne plu kanonoj tondras, ke ne plu flugmaŝinoj ronkas kaj dropas bombojn kaj bombegojn, ke ne plu homoj buĉas homojn, kaj ke ne plu liberemaj popoloj estas turmentataj kaj frakasataj per la ferumitaj soldatobotoj de fieraj, ambiciaj aventuristoj kaj ruzaj krimuloj.

— Estas ĉiam bone diri la veron. Tiam oni ne devas memorteni kion oni diris.

Tuta la homaro suferis sub la premado de la militomonstro. Por ĉiu honesta kaj bonvola homo la milito signifis : mizero, doloro, teruro. Sed plej superfiga ĝi estis por la pacifistoj, por homoj esperantistaj, kiuj vidis la altan pacoidealon piede dispremita kaj kovrita de sango, koto kaj slimo.

La militomonstro minacis sufoke nin kaj ruinigi ĉion, kio estis tiom zorge konstruita per laboro peniga.

Ĉu ĉiu laboro paciga, kiu estis farita, vaniĝis ? Ĉu ĉio pereos en sanga ondo ? La koroj niaj malgrandis, kaj apenaŭ ni povis kredi al iama repaciĝo.

Ho, tiu sopiro al paco ! En januaro mil naŭcent kvardek unu mi en-vortigis ĝin tiel :

Paco !

Tempo flugas  
kaj jam plugas  
sulkojn tra va vivokamp',  
kie trene kaj lacego  
plueniras ni en ramp',

Tempo skurĝas  
kaj jam urĝas  
repaciĝo en la mond'  
por ke fine ni saviĝu  
el la ruga, sanga ond'.

Jaraj pasas  
kaj frakasas  
mondon sub laciga prem'  
de militoj kaj kvereloj  
fordronantan en plorĝem'.

Al la paco ni sopiras,  
al la paco sur la ter',  
al la paco ni deziras,  
realigon de l'esper'  
kiun portis la homaro  
tiom zorge, plenfidante,  
malgraŭ timo kaj mizer'.

Kaj nun la paco, multe dezirita, realigis. Nia deziro estas plenumita. La homoj surprizite rigardas unu la alian, kaj ie kaj tie aŭdigas.

— La mensogo estas la armilo de la malfortuloj.

— Estu sklavo de la vero. La sklavo de la vero estas libera homo.

(Araba proverbo)

Paco, paco, sankta paco,  
vi, de Dio la donaco,  
revenu, por ke nia kor'  
kantu en decida hor'  
kaj klinlu en ador'  
antau Vi, ho Disinjor'...

Jen mi sendas al vi kelkajn poemojn, kiujn verkis John.  
Se ili placas al vi, vi povos uzi ilin por ia Esp. jurnalo.

### Pluvo.

Pluvo, pluvo tiktakadas  
sur tegment' de mia dom';  
pluvo, pluvo frapetadas,  
mi aŭskultas, sola hom'.

Mi klopodas kalkuladi  
la kiomon de l' gitar';  
vane tamen, ĉar sekvadi  
ja maleblas pro l' multar'.

Bruegado resonadas  
en la koro mia, ĉar  
dume ke mi pensrevadas  
plidensigas la gitar'.

Ciuj gutoj kunfandiĝas;  
estas nun potenca son',  
mia kor' pli, pli moliĝas  
per ĉiela pluva ton'.

Ho, mi dankas la ĉielon  
pro la beno de l' gitar';  
gustas mia kor' mielon,  
ekfalintan el nubar'.

### Extase.


We zagen elkaar  
en waren vrienden;  
zijn huid was zwart,  
de mijne blank,  
maar  
broederbanden binden  
ons te zaâm  
van hart tot hart.  
Ons samen zijn

was als een droom  
die al te snel vervloog  
en van ons week;  
mijn vriend ging heen,  
doch  
onze harten vloeiden saâm  
en zijn voor een wig één.

Junio 1945.

- *Havu la kuraĝon kritiki vin mem por forigi al vi la humiligon de la kriti-  
koj de aliaj.*  
— *Memre spekte, memkono, memdominacfo, tiuj tri kondukas la vivon al ia  
plej alta forto.* (Tennyson)  
— *La vera kuraĝo ne estas ne havi timon, sed venki timon,*

## ■ Kruevortenigmo ■



### — VERTIKALE :

- 1— Sanigilo.  
3— nigra ludkarto — la kato estas... besto.  
4— okcidenta aziano. R. — elpusi krion. (pasiva estanta participo) R.  
5— frotilbriligi — konjunkcio — plenumi ordonojn. R.  
6— malmola korpparto. — sufikso.  
7— prefikso — parto de la nazo.  
8— persono kiu havas dudek ses jarojn, estas...  
9— puno de la roma katolika eklezio. R. — ripozodi dum la nokto. R.  
10— sufikso. — duondorni.  
11— pers. pronomo. — denove. — maljuna. R.  
12— maljuna — artikolo — parto de la monato.  
13— montaro en sud-Ameriko.  
14— orangeto.  
16— signo sur kelkaj leteroj R.

## II. - HORIZONTALALE :

- 1— eta — sovaga besto el Australio. R.
- 2— ligo
- 3— unua vorto el la titolo de bruga esperantista revuo. — virino el la ludkarto. R — provizi je armilojn. R.
- 4— parto de la okulo R. — sufikso — prepozicio.
- 5— ni vidas ĝin en atlaso. R. — ruga ludkarto R. — kreskaja kun bluaj aŭblankaj floroj. R.
- 6— verdrestanta arbo. — gemo. R.
- 7— ekkrio de doloro. — konjunkcio.
- 8— familinomo de bonfama bruga esperantisto.
- 9— fluajo. R. — loko R. — teritorio. R.
- 10— p rs pronomo — sufikso — faro (+ gramatika N)
- 11— agado. — D M.<sup>2</sup> — gajeco.
- 12— svarmo de abeloj. R.
- 13— lasta vorto el la titolo de bruga esperantista revuo. — familinomo de bonfama bruga esperantisto.

A. SPRUYTTE.

10-11-1945.



---

Jen la Unva numero de la kvina eldonjaro!

RENOVIGU VIAN ABONON !!

« PACO kaj JUSTECO »

disvastigos — La enhavo plibonigos!

La abonprezo estas vera tiel malalta ke vi preskaŭ ricevos nian revuon senpage! Pagu tuj 25 frankojn al nia propagandoservo aŭ sendu la kotizon al postekeo 291429 de Maertens Grégoire, Nieuwstraat, 54, Assebroek! Varbu novaj abonantojn, vi ricevos belegan premion!

LA FLANDRA ESPERANTOMOVADO vin dankas.

---